# Laŭokaza Novaĵletero.

Organo de la

Internacia
Komerca kaj Ekonomia
Fakgrupo.

P.O. Kesto 25041,
3001HA Rotterdam,
Nederlando.

IKEF ★ 1984

Numero 8; oktobro, 1985.


## Ĝ.S. raportas ...

Kompare kun tiu dum la semajnoj tuj antaŭ la Fondkunveno, la nuna vivo de via Ĝenerala Sekretario estas agrable kvieta, kaj tiel ekde la enpoŝtigo de la lasta Novaĵletero. La ĉefa ero por raporti estas, ke la Estraro komencis la antaŭviditan kunlaboradon, kvankam estas evidente jam, ke pro la neceso trakti ĉion perletere inter kvin landoj, progreso estas iom malrapida. La esence necesa unua decido, tamen, estas jam prenita.

La Estraro elpensis taŭgan modifon de la konata metodo interŝanĝi diskutpaperojn pri apartaj temoj, kaj jam ni atingis plenan interkonsenton, adopti tiun metodon.

La ĉefa afero diskutata inter Estraranoj nunatempe estas la bazo sur kiu konstrui ĝeneralan reguláron por la Fakgrupo; pri tio ni, perefle, raportos pli detale en la proksima Novaĵletero.

La dua temo por la Estraro, kaj tiel por la tuta membraro, estas la tre grava, konstanta deĵoro:

varbi pli da membroj.

Dum la Estraro diskutadas la temon por atingi konkludon pri iu nova, pli efika agadmaniero, ĉiu Membro havas ankoraŭ la devon provi varbi inter kolegoj, konatuloj kaj kaj-tiel-plu-oj, uzante la kutiman metodon de persona interparolo.

Ni jam proponis la provizon de la informfolio pri la Fakgrupo, (kaj sendis jam provizon al petintoj), kaj la ceteron ni devas lasi al vi. Ligita kun tio, ni havas apartan proponon, ke niaj Membroj varbu ankaŭ la propran entreprenon aŭ la entreprenon-dunginton. La kosto de membreco al tiu entrepreno estus nur bagatelo, sed por ni ĝi certe ne estus sensignifaĵo. Pro manko de mono, nia Fakgrupo ne povas, provizore, startigi grandskalan kampanjon varbi inter eĉ la entreprenoj konataj al Esperantistoj, sed se kaj kiam ni ja starigos tian kampanjon - kiel ni devas! - la nomoj de tiuj entreprenoj jam konataj kiel Organizaĵoj-Membroj ricevos honoran mencion meritatan. Ek al la tasko!

Tiuj ĉi vortoj de la Ĝenerala Sekretario venas ankaŭ de la Financa Konsilanto, ja sama individua persono, kaj tiu F.K. havas peton por vi ĉiuj. Tiu peto estas la plej simple imagebla: faru pagon al la kaso! La kaŭzo ankaŭ estas tre simple klarigebla: ni elspezis pli da mono ol ni enspezis, kaj nun disponas pri granda negativa kapitalo. Volonte ni 'vendus' tiun negativan kapitalon al la unua mecenato, kiu donacus al ni sumon pli grandan ol kvin cent guldenoj, sed kun egala ĝojo ni agnoskus ricevon de aro da malpli grandaj donacoj tiel, ke la 'vendo'-sumo estas atingita en alia maniero. Sed la afero estas relative urĝa! Baldaŭ ni fermos la kontojn je la lasta tago de la kalendara jaro; por eviti mondskalan disvastigon de la ekscio, ke la 'komercistoj' de la E.-Movado ege malbone ordigas proprajn aferojn, necesas, ke tiuj donacoj venu en la daŭro de, ni diru, la proksimaj ok semajnoj.

Kaj jen taŭga okazo fari mencion

pri la jarkotizoj por la proksima jaro. Al tiuj inter vi kiuj ne jam pagis anticipe la kotizon, ni direktas peton ne forgesu la grandan helpon donitan al ni per fruaj pagoj. Nek ignoru la helpon, en la formo de malapero de zorgoj, al vi mem per anticipa pago por pluraj jaroj kune.

Al ĉiuj Membroj ni volas denove peti vian materian subtenon por la Subtena Fondaĵo, kiu ekzistas por membrigi, per pago de kotizoj, kandidatojn en landoj ankoraŭ evoluantaj kaj kiuj, pro tio, spertas transpagajn malfacilaĵojn. Kandidatoj taŭgaj ne mankas al ni; la manko estas tio de monrimedoj. Ni dependas je niaj Membroj en la evoluintaj landoj etendi la manon de vera solidareco al kolegoj en malpli riĉaj landoj. Ĉiu donaco ricevus mencion kun dankesprimo.

Se iuj nunatempe hezitas varbi novan membron pro penso, ke taŭgus iom atendi por fari pagon de kotizo nur por la nova jaro, ni povas konsili, tamen fari la pagon kun peto, ke ĝi estu valida nur ekde la nova jaro; ni aranĝos aferojn laŭ tiu peto. Ne eblas tro emfazi la gravon de varbagado por la sano de nia Fakgrupo en la nuna stadio; ĉiu nova nomo por nia membro-listo kuraĝigas aliajn kandidatojn.

LM

- - - - - - - - - - - - - - - - - - oo - - - - - - - - - - - - - - - - - -

## *Interŝanĝo de ideoj.*

Kore ni dankas pro multaj ricevitaĵoj dum la pasintaj ok semajnoj.

En 'La Espero el Koreujo' ni legas pri la intenco de la sudkoreanoj formi propran organizaĵon cele al plifaciligo de interrilatoj kaj plivastigo de la utileco de Esperanto en la 'ekonomia-komerca kampo'. Tia organizaĵo certe meritas la subtenon de nia Fakgrupo; dum pluraj semajnoj ni interŝanĝadas leterojn kun S-ro I. Ĝungi, (unu el la redaktoroj de 'La E. el K.' kaj kunfondinto de la nova asocio), el kiuj ni eksciis jam pri la intenco starigi firman ligon kun ni, tuj kiam eblos. Sendube la nova asocio ĝatus ricevi bondezirojn de niaj Membroj. La adreso: Korea Ekonomia-Komerca Esperantista Organizaĵo, P.O. Kesto 5154, Seulo 100, Suda-Koreio. (La prialudita kajero estas leginda ankaŭ pro bele ilustrita alvoko feriumi en Suda-Koreio kaj pensi jam pri vizito pro la Olimpikaj Ludoj post tri jaroj. Petu ekzempleron!)

De la nove starigita Monda Federacio de Kulturaj Asocioj, (MFKA), ni ricevis provekzempleron, (numero nulo), de 'La Gazeto', kies redaktoro estas D-ro Eugène de Zilah, en Metz, Francio. Laŭ priskribo de tiu Redaktoro, la plej grava celo de La Gazeto estas plenigi la vakuon senteblan en la lerneja instruado pri la kulturo, kiu estas fono por la internacia lingvo, kaj tion fari per organizo de "giganta perkoresponda lernejo". Tiu ĉi prova kajero certe faras bonan komencon, (kvankam verŝajne tre malmultaj ekonomiistoj plene akceptus la konkludojn de la artikolo, 'Prezoj kaj kurzoj', kaj al mi persone ŝajnas tre bedaŭrinde, ke nova gazeto tiel facilanime akceptas kripligitan formon por la 26-a litero de nia alfabeto). Adresu informpetojn al: 39, rue J. Hénot, 57070 Metz, Francio.

El Italio, venis la revuo de la Itala E.-Federacio, en kiu, kiel kutime, troviĝas ampleksa aro de raportetoj pri "la vivo Esperantista". Ĉi-foje, tamen, ni atentigas pri leginda kontribuo el la plumo de William Auld; el ĝi ni citas:

Leĝo pri Oficiala Aprobo
La aprobo pri Esperanto esprimita de politikisto estas inverse proporcia al lia potenco en la registaro, aŭ, se lia partio estas opozicia, ĝi estas rekte proporcia al la malforteco de lia partio.

Leĝo de la Celo en Gloro
Kiam aktiva Esperantisto atingas postenon, kie li povas antaŭenigi Esperanton, tiam li ĉesas esti aktiva Esperantisto.

Tre gravan atenton meritas artikolo en El Popola Ĉinio, por okt-

obro. Sub la titolo, Reformo de urba ekonomia strukturo en Ĉinio, la artikolo citas, kaj pridiskutas, sep decidojn de la registaro, en la ekonomia kampo. Estas evidente, ke fundaj esploroj estis faritaj antaŭ kunmeto de la decidoj, kaj kvankam la artikolo ne provas esti pure scienca traktaĵo, sufiĉe da statistikaj donitaĵoj estas cititaj por kredebligi la eblecon plenumi la decidojn. Kaj en tiu kazo, la cetera mondo certe havos potencan rivalon en la komerca-ekonomia kampo! Aparte impresas, je la dua legado, la klarvidaj intencoj reformi la sistemon de financo, kaj aktive disvolvi ekonomiajn kaj administrajn manierojn, sed la tuta artikolo meritas esti deviga legaĵo por ekonomiistoj. Kiel kutime, ankaŭ la cetera enhavo de la kajero estas leginda kaj rekomendinda.

Pruvoj, ke la E.-Movado en Ĉinio plivigliĝadas venas al ni en la formo de informpetoj.

Kiel unu sekvon, ni havas firman kontakton nun kun la E.-Grupo en Universitato ĉe Anhui, pere de S-ro Wang, la instruisto, kiu ankaŭ gvidas per-elsendan kurson en Esperanto pere de la loka radio-stacio. S-ro Wang asertas, ke eblos al li transdoni informojn ekonomiajn-komercajn pri Ĉinio, al interesitoj, post starigo de daŭre funkciebla sistemo. Espereble, baldaŭ eblos al ni aŭ li solvi la financajn problemojn tiel, ke ni aldonu lin al nia membro-listo.

Por alia kandidato en Ĉinio ni perigas reklamanonceton pri papertranĉaĵoj eksporteblaj denove, post interkonsento. Ni esperas, ke ankaŭ S-ro Liang baldaŭ aliĝos al nia Fakgrupo.

Nova, tre detala raporto venis el Togolando, kiel aldonaĵo por la skizaj informoj, pri kiuj ni aludis pasintfoje. Estas evidente, ke tiu lando vere estas "koninda", kiel asertas al ni S-ro Gbeglo; ni volas aldoni nian esperon, ke iu membro nia akceptos la proponon turismume viziti la landon. La nova raporto bezonas iom da ordiglaboro por prepari ĝin por aperigo, sed tion ni esperas fari por baldaŭa Novaĵletero.

La limdato por la proksima Laŭokaza Novaĵletero estos la 15-a de decembro, en Rotterdam. Ĉu antaŭ tiu dato iu Membro povas imiti la imitindan ekzemplon de D-ro Picasso, kiu varbis por ni la pagitan (!) reklamanoncon je la lasta paĝo? Ek al la tasko!

Kaj ne forgesu nian aforismon:

al la mondo pli valoras niaj atingoj ol niaj esprioj!

LM

- - - - - - - - - oo - - - - - - - - -

Insigno-desegnaĵoj.

de S-ro J.-M. Kboge Mbele:




de D-ro M. Picasso:




de S-ro J. Ĉelikovski:



# REKLAMANONCOJ REKLAMANONCOJ REKLAMANONCOJ

Reklamtarifoj:

a) por Membroj de IKEF:

unu anonceto ĝis inkluzive ses linioj: senpage;

por pli longaj anoncetoj: po 1 respondkupono, (irpk), por ĉiuj ses linioj, inkl. de la unuaj ses linioj. Ĉiam antaŭpage mendendaj.

b) por ne-Membroj de IKEF:

po 1 irpk por ĉiu linio, aŭ por ĉiuj kvin milimetroj de alteco, enkadrigita, sed kun minimumo de kvin irpk-oj.
Ĉiam antaŭpagita.
Por anonco, je pli granda larĝeco ol unu kolumno: laŭ aparta interkonsento.
Ĉiam: tri aperoj de la sama anonco en sinsekvaj kajeroj por la prezo de du aperoj.

Kurzo: 1 irpk = 0,90 gld.

Reklami estas anonci;
ju pli vi informas,
des pli vi vendas.
COMUNICAZIONE IMMAGINE por teknikaj katalogoj, broŝuroj, reklamanoncoj, en ĉiuj lingvoj.
via D. Gasperi 7,
20057 Vedano A.L., Italio.

---

S-ro Liang Ke deziras korespondi, kaj eksportas papertranĉaĵojn, ktp, tutmonde.
adreso: CHAOYANGQU,
DONGDAQIAOLU 12 (NEI),
PEKINO, Ĉinio.

---

Pensu pri
Mondkomerca Eldonejo Esperantista
por viaj komercaj bezonaĵoj.
P.O. Kesto 25041,
3001 HA Rotterdam, Nederl.

---

## 46-a Internacia Foiro pri Fiŝkaptado

## Ankono (I): 5/8-a junio 1986

— Teknikoj kaj ekipoj por fiŝkaptado
— Fiŝkonservado
— Fiŝlaborado
— Akvokulturo

Ejo por ĉarma renkontiĝo
ĉe Adriatika centritala marbordo

Fiera di Ancona - telex 561263 FIERAN I